



Boletín

n° 434 Aprilo - Junio 2021



79_A

HISPANA ESPERANTO- KONGRESO

Virtuala Kongreso
2/3 de Oktobro 2021



FEDERACIÓN
ESPAÑOLA
DE ESPERANTO
HISPANA ESPERANTO-FEDERACIO

Hispana Esperanto-Federacio



Asociación de utilidad pública

Boletín

Bulteno de Hispana Esperanto-Federacio
aperanta de 1949
Numero 434

Redakto-skipo
Direktado kaj kompostado: Ángel Arquillos L.

Revizio: J. A. del Barrio

Retadreso de la bulteno:
bulteno@esperanto.es
angelarquillos@gmail.com

*Pri la enhavo de la artikoloj respondecas nur la respektivaj aŭtoroj

* La redakcio rajtas rifuzi nepetitajn artikolojn

*Republikado de enhavo nur permesita kun permeso de la redakcio aŭ de la aŭtoro

Financaj aferoj: financoj@esperanto.es

Aliaj aferoj (escepte de financaj):

admin@esperanto.es

Hispana Esperanto-Federacio *Federación Española de Esperanto*

Rodríguez San Pedro, 13, 3º, 7

ES-28015 Madrid

admin@esperanto.es

Bankokonto BBVA: ES85 0182 1252 31
0204011961

TRIODOS BANK: ES24 1491 0001 2420 0926
4025

Poŝtelefono: +34 638 547 104

Telefono: +34 914 468 079 (bv. lasi mesaĝon
en la aŭtomata respondilo)

Estraro

Prezidanto: Ángel Arquillos López

Vicprezidanto: Alberto Granados Orcero

Sekretario: Manuel Parra

Vicsekretario: Isidoro Ortega López

Kasisto: Jesús M. García Iturrioz

Voĉdonantoj: Vicente Manzano (Viko)

“ Ana Manero

Prezidanto HEJS

kaj voĉdonanto: William Guerrero

Presejo: Gráficas Notivol (Zaragoza)
DL: M-39811-2012 / ISSN 2444-8400

SALUTVORTOJ

Karaj legantoj,

La misfortuno tuŝis min kaj dum kelkaj monatoj mi ne povos moviĝi de sur mia fotelo, pro akcidento, kiu rompis la tibion kaj peroneon de mia dekstra kruro. Mi bonfartas, sed la fotelo, kiu estas por ripozado lacigas min kaj mi estas devigata fari rekapabliĝon dum minimume du monatoj, kaj tia stato lacigas kaj enuigas min.

Pro tio mi petas senkulpigon pro la prokrasto aperigi la trimonatan Boletín, kiu finfine aperas danke al la valora kontribuo de José Antonio del Barrio, kiu revizias kaj korektas ĝin.

Bedaŭrinde somero estas malbona sezono por sidiĝi ĉe tablo kaj verki artikolon pri novaĵoj, ĉar multaj el ni ferias kaj mi profitas la okazon publikigi interesan artikolojn ricevitaj el Portugalio kaj la gravan kontribuon de Dennis Keefe, kiu mirigos vin, ĉar la projekto estas vere ambicia kaj mi deziras al li ĉion la plej bonan pro tiu granda kaj fruktodona laboro. La raporto de la komenco ĝis la fino valoras la penon esti legata kaj publikigita en Boletín.

Feliĉan someron al ĉiuj, kvankam pro la pandemio ni ne povos ĝui ĝin laŭ nia bontrovo.

La Redakcio

ENHAVO

Salutvortoj	1
Lastminuta novaĵo	2
Protokolo Ordinara Ĝenerala Kunveno 2021	3
La 2-a V. K. de Esperanto sukcesis	6
79-a Hispana V. K. de Esperanto	7
Eksterordinara Ĝenerala Kunveno	8
Pri Grupoj kaj Asocioj	9
Reeldono de la lernolibro de M. G. Adúriz	10
Kampanio al UNESKO pri la Esperanto-Tago	11
Debato pri la estonteco de Eŭropo	11
Novaj Modeloj por Zoomaj Kursoj	12
La plej longa fervoja linio	20
Iom da matemático	22
Kjara rakontas pri si mem	24
Studo pri iberiaj lingvoj de esperantisto	28

LASTMINUTA NOVAĴO!

“LINGVO, VIVO, TERO: JARDEKO DE INDIĜENAJ LINGVOJ”

La de UN kaj Unesko proklamita Jardeko de Indiĝenaj Lingvoj komenciĝos la 1-an de januaro 2022. Nia Asocio elektis kiel temon de la Universala Kongreso de Esperanto en Montrealo 2022 la temon “Lingvo, vivo, tero: Jardeko de Indiĝenaj Lingvoj”. La Kongreso estos unu el la internaciaj aranĝoj, kiuj helpas lanĉi la Jardekon por la periodo 2022-2032. Festante la Internacian Tagon de la Indiĝenaj Popoloj de la Mondo 2021, ni anoncas nian fortan subtenon de la Jardeko, kiu formas okazon por festi kaj firmigi la kulturajn kaj lingvajn diversecon, antaŭenigi inkluzivigon kaj homajn rajtojn, kaj konstrui pacon kaj evoluigon.

Gazetaraj Komunikoj de UEA n-ro.971

PROKOLO ORDINARA ĜENERALA KUNVENO 6a DE JUNIO 2021

La 6-an de junio de 2021 je la 10:00 horo, laŭ kunvoko de la Prezidanto, okazis Ordinara Ĝenerala Kunveno de Hispana Esperanto-Federacio pere de virtuala konferenco, laŭ la jena tagordo:

- 1.- Legado kaj aprobo de la protokolo de la antaŭa kunveno (18okt2020)
- 2.- Aprobo de la kontoj kaj kas-stato de 2020
- 3.- Aprobo de la raporto pri aktivaĵoj de 2020
- 4.- Informo pri la anaro
- 5.- Aprobo de la Buĝeto por 2021.
- 6.- Kotizoj por la jaro 2022
- 7.- Projektoj por 2021-2022
- 8.- Sugestoj kaj demandoj

Ĉeestantoj:

Ĉeestas la kunvenon, ĉu fizike en la sidejo, ĉu diste per la reto, 5 membroj de la estraro kaj pliaj 14 membroj de HEF. Entute, 19 partoprenantoj, 5 el ili reprezentataj de aliaj anoj, kaj ankaŭ estas reprezentataj la Grupoj: Astura, Kantabra, Bilbao, Fuenlabrada, Madrido (Liceo), Liberano (Teruelo) kaj Frateco (Zaragoza); kaj la junulara sekcio HEJS.

- 1- Legado kaj aprobo de la protokolo de la antaŭa kunveno (18okt2020)

Ĝi estis publikigita en Boletín numero 431. Oni aprobas unuanime.

- 2- Aprobo de la kontoj kaj kas-stato de 2020.

La propono de kontoj kaj kas-stato de la jaro 2020 estis publikigita en Boletín numero 433. Post diversaj klarigoj fare de la kasisto, oni aprobas unuanime.

- 3- Aprobo de la raporto pri aktivaĵoj de 2020.

La raporto pri aktivaĵoj de la jaro 2020 estis publikigita en Boletín numero 433.

Oni rimarkas ke en la raporto jen kaj jen mankas konkretaj datumoj pri evoluo de la diversaj agadoj. La sekretario notas tion por la sekvaj okazoj.

La raporton oni aprobas unuanime.

4- Informo pri la anaro.

La resuma informo pri anaro de la jaro 2020 estis publikigita en Boletín numero 433. Ni konstatas, ke la asocio ade malkreskas. La nombro de novaj membroj ne sufiĉas por kompensi la perdojn.

Ni proponos al la gvidantoj de la kursoj de UNED kaj de KEL, ke la lernantoj ricevu la eblon ekricevi la Bitbultenon.

5- Aprobo de la buĝeto por 2021.

La propono de buĝeto por la jaro 2021 estis publikigita en Boletín numero 433.

Oni aparte klarigas pri la elspezoj por instruado kaj por eldono de libroj.

Oni demandas ĉu la libroj donace ricevitaj el UEA devus esti konsiderataj kiel enspezo.

La kasisto respondas ke ne, same kiel ĉiuj libroj kiujn la biblioteko ricevas donace.

Post tiuj klarigoj oni aprobas la buĝeton unuanime.

6- Kotizoj por la jaro 2022.

La estraro proponas plu teni la samajn kotizojn por la jaro 2022.

Oni aprobas unuanime.

7- Projektoj por 2021-2022

-Daŭrigi la instruadon en la universitato UNED de la du kursoj nun instruataj (nivelo A2 kaj nivelo B1).

-Nun okazadas per la reto la kurso por hispanlingvanoj aranĝita de Kolombia E-Ligo, kun pli ol 500 lernantoj, el ili 33 el Hispanio.

-Antaŭ kelkaj tagoj HEF sendis leteron al ĉiu grupo de la hispana deputitejo, proponantan agnoskon de la lingvo Esperanto en la naciaj eduk-sistemoj kaj rangigi ĝin kiel labor-lingvo en la eŭropuniaj institucioj.

- Se en 2022 okazos fizika IJK, HEF denove subvencios partoprenon de membroj de nia junulara sekcio.

- Vigligi (re)fondon de asocioj regionaj kaj urbaj. Oni konstatas la malfacilecon de ĉi tiu tasko.

-Organizado de la ĉi-jara Hispana Kongreso, kiu okazos virtuale la tagojn 2an kaj 3an de oktobro. Jam ekzistas provizora programo.

-Organizado de la Hispana Kongreso de la jaro 2022 en Comillas, Kantabrio, laŭ la preparoj faritaj en 2019.

-Ĵus HEF reprenis la lernolibron Esperanto, curso bázico, de MGA, ĉar ĝi estis elĉerpita

La aŭtoro transdonis la plenan rajton pri la verko al Fundación Esperanto, kaj ĉi tiu institucio permesis al HEF la nunan represon. Ĝia ĝenerala vendoprezo estas 12 €; por HEFanoj 10 € kaj por grandaj mendon (dek aŭ pli) po 7 eŭroj, ĉiam plus sendokosto.

-HEF omaĝos kaj la poeton Lorca kaj la tradukiston De Diego per bita eldono de la libro Cigana Romancaro, eldonita en 1971, kaj eldono de nova antologio de poemoj de Lorca en traduko de Miguel Fernández. Prezentos ilin Duncan Charters en nia virtuala kongreso. Kaj oni demarŝos por aranĝi pliajn prezentadojn de ambaŭ verkoj en diversaj institucioj.

- Estas jam lanĉita en la retejo de HEF la nova ret-versio de la Gran Diccionario Español-Esperanto, de De Diego.

-Estas projekto krei en la retejo de HEF datenbankon pri Proverbaro ambaŭdirekta, kiu estos konstante ĝisdatigita.

-HEF partoprenos en la Internacia Kongreso pri Interkultura Komunikado (IKIKO), okazonta en decembro.

8- Sugestoj kaj demandoj.

Oni informas, ke kelkaj membroj de HEJS, la junulara sekcio de HEF, partoprenis en la aprila evento de TEJO nomata RETOSO. Unu el ili volontulas nun en la Esperanto-Asocio de Tuluzo. Junuloj renkontiĝis en Madrido en oktobro 2020 kaj en aprilo 2021. Lastatempe HEJS havas kvar novajn membrojn. La studento pri antropologio finis sian esploradon pri la rolo de Esperanto kaj ĝia disvastigo en Hispanio. Li havigos al HEF kopion de la laboraĵo.

Oni petas ke aperu mencioj ankaŭ pri la agado de HEJS en la jaraj agadraportoj.

Madrida E-Liceo partoprenos la institucian madridan aranĝon La noche de los libros, okazontan la 2an de oktobro, verŝajne en rilato kun la dirita Projekto Lorca.

Ankaŭ MEL nun intertraktas kun la mezlernejo Pedro Salinas por ebla prelego.

Pri la rilato de HEF al Eŭropa Esperanto-Unio, la eksa prezidanto klarigas, ke, jam de la jaro 2011 HEF decidis ne kotizi, kiel esprimo de ne akordiĝo kun la sinteno de EEU pri ĝia ideo de Eŭropo kaj ĝia neneŭtrala agado en kelkaj aferoj. Argumentadon oni trovu inter-alie en Boletín numeroj 404 (p. 11-12) kaj 411 (p. 25-26). EEU jar-kunvenis antaŭ kelkaj tagoj. HEF estis reprezentita de José Antonio del Barrio, kiu tiam subite eksciis ke ĉijare jes HEF rekotizis.

La estraro pardonpetas al li pro tio ke ni forgesis informi lin pri la ŝanĝo de sinteno. Ĉi tiu temo estos en la tagordo de la eksterordinara ĝenerala kunveno okazonta la 3an de oktobro.

Invito partopreni en la 2-a Virtuala Kongreso de UEA:

Pro la nuligo de la planita UK en Belfasto, ankaŭ ĉi-jare UEA okazigos Virtualan Kongreson, tial ni invitas vin partopreni ĝin kaj helpi por ĝia sukceso.

Do, HEF instigas siajn membrojn aliĝi en ĝi, kaj eĉ proponi programerojn por la kongreso. Ĝi okazos de la 17-a ĝis la 24-a de julio.

La kunveno finiĝas je la 12:37 horo.

Manuel Parra

Sekretario

LA 2-a V.K. SUKCESIS KIEL ATENDITE

La 17-an de julio, mi havis la okazon ĉeesti rete la 2-an Virtualan Kongreson de Esperanto, kaj mi tre ĝuis la bonan organizon kaj la interesan prezenton. Fernando Maia kaj Orlando Raola faris gravan laboron kiel kutime presentante la plurajn intervenantojn, ĉar ili jam spertas pri virtualaj kongresoj. La prezidanto de UEA Duncan Charters faris mallongan prelegon pri la kongresa temo “Paco kaj konfido: universalaj valoroj”. Margaret Zaleski-Zamenhof salutis el Britio. Pro manko de tempo estis neeble saluti nome de la naciaj asocioj kaj nur 5 homoj salutis nome de la kvin kontinentoj, inter ili la hispanino Maria Luisa Soriano el Sevilo, kiu per bona kaj belsona Esperanto salutis nome de Eŭropo. Ankaŭ la prezidanto de ILEI, Mireille Grosjean, SAT, kiu ĉi-jare centjariĝas, prezidanto de TEJO kaj aliaj salutis la kongresanojn nome de iliaj asocioj, interalie.

Ne mankis muziko por la malfermo, ĉar la mondkonata muzikgrupo Asorti, koncertis per viglaj kaj belsonaj temoj en Esperanto por ĝojigi la ĉeestintojn kaj tuj poste denove intervenis la prezidanto de UEA por deklari malfermita la 2-an Virtualan Kongreson de Esperanto.

Ángel Arquillos

79a HISPANA KONGRESO DE ESPERANTO (Virtuala Kongreso 2/3 oktobro 2021)

Kiel ni anoncis en pasinta Boletín, la kongreso programita por la urbo Comillas en Kantabrio translokiĝis al la jaro 2022, sed tamen HEF ne rezignis organizi nian 79-an Hispanan Kongreson kiu, unuafoje en la historio de niaj renkontiĝoj, okazos virtuale. Notu la datojn de la 2-a kaj 3-a de oktobro, en kiuj disvolviĝos diversaj aranĝoj, kiuj provos havigi al ĉeestantoj la guston de niaj renkontoj, eĉ se mankos la fizika kontakto kaj la rekta interparolo.

Trovu ĉisube la unuan malneton de la programo, kaj kontaktu kun la asocio se vi deziras iel kontribui al ĝi.

Pere de la retaj komunikiloj de HEF ni informos pri la finaj detaloj, pri aliĝo kaj kontakto. Se vi deziras ricevi la informojn kaj vi ne estas certa ke HEF havas viajn retajn datumojn, bv skribi al nia adreso admin@esperanto.es.

Oktobro, la 2an (Sabato).	
Matene	15 minutoj Malfermo de la kongreso kaj salutvortoj de la Prezidanto de HEF
	75 minutoj Omaĝo al Lorca kaj Fernando Diego (Ana Manero, Duncan Charters, Miguel Fernández)
	15 minutoj Distraĵo (spritaĵoj, kantoj, filmetoj...)
	15 minutoj Omaĝo al Antonio Marco Botella
Vespere	120 minutoj: “Scienco kaj Esperanto”
Oktobro, la 3an (dimanĉo)	
Matene	60 minutoj Ĝenerala kunveno de HEF
	15 minutoj Distraĵo (spritaĵoj, kantoj, filmetoj...)
	15 minutoj: Filmeto pri lastatempaj HEK
	15 minutoj: Prezento de la 79a HEK, en Comillas
	Fermo de la kongreso

ASAMBLEA GENERAL EXTRAORDINARIA

El Presidente de la Federación Española de Esperanto invita a los miembros de la asociación a participar en la Asamblea General Extraordinaria, que tendrá lugar el domingo 3 de octubre de 2021, a las 9:30 horas (a las 10:00 en segunda convocatoria) en el marco del 79º Congreso Español de Esperanto, que se realizará por medios virtuales, con el siguiente orden del día:

- 1.- Lectura y aprobación del acta de la anterior asamblea (6 de junio de 2021)
- 2.- Búsqueda de un nuevo redactor para Boletín
- 3.- ¿Ha de pagar HEF su cuota a Eŭropa Esperanto-Unio en 2022?
- 4.- ¿Le interesa a HEF comprar o alquilar un trastero?
- 5.- Proyectos para 2021-2022
- 6.- Ruegos y preguntas

IMPORTANTE: Los miembros de la Federación que deseen ser representados por algún otro socio, deben enviar un mensaje indicando claramente el nombre completo del representante y representado, al buzón electrónico: admin@esperanto.es o bien por correo postal a las oficinas de la asociación, antes del 30 de septiembre.

El Presidente de la Federación
Ángel Arquillos López

EKSTERORDINARA ĜENERALA KUNVENO

La Prezidanto de Hispana Esperanto-Federacio alvokas la anojn de la asocio partopreni Eksterordinaran Ĝeneralan Kunvenon, kiu okazos la 3-an de oktobro de 2021 (dimanĉe), je la 9:30 horo (je la 10:00 horo en dua alvoko), kadre de la 79ª Hispana Esperanto-Kongreso, kiu okazos per virtualaj rimedoj, laŭ la jena tagordo:

- 1.- Legado kaj aprobo de la protokolo de la antaŭa kunveno (6a junio 2021)
- 2.- Serĉo de nova redaktoro por Boletín
- 3.- Ĉu en 2022 HEF rekotizu al Eŭropa Esperanto-Unio?
- 4.- Ĉu ĉi tiu aĉeti tenejon?
- 5.- Projektoj por 2021-2022
- 6.- Sugestoj kaj demandoj

GRAVAJ RIMARKOJ: La membroj de HEF, kiuj deziras esti reprezentataj fare de alia membro, sendu mesaĝon informante pri tio, klare indikante la kompletan nomon kaj de la reprezentanto kaj de la reprezentato, al HEF-a retpoŝta adreso admin@esperanto.es, aŭ per ordinara poŝto al la oficejo de la asocio, antaŭ la 30-a de septembro.

La Prezidanto de HEF
Ángel Arquillos López

PRI GRUPOJ KAJ ASOCIOJ

ESPERANTO-TAGO EN ARAGONO

Aragono
Zaragoza



En la nuna jaro, indas rakonti pri diversaj okazaĵoj en Zaragoza rilate al "Tago de Esperanto".

Ĉe antaŭtago sentiĝas ekesto de festo ("Por la víspera se conoce al santo"). Tiel oni povus diri ĉar, profitante la dimanĉan tagon antaŭan, esperantistoj kaj simpatiantoj rendezuis ĉe monumento al Esperanto (kiu situas en "Glorieta del Esperanto"). Agrabla surprizo estis la apero de Alberto Granados, HEF-vicprezidanto kaj prezidanto de la asocio "Liberanimo" de Teruelo.

La 26an de julio, danke al informado de HEF al amaskomunikiloj, TV kaj radio interesiĝis pri la afero.

"Aragón TV" (la regiona TV-kanalo) venis al nia sidejo por filmado kaj intervjuado. Tie parolis Lorenzo Noguero (prezidanto) kaj Pablo Conesa (instruisto). Fine, raporteto aperis en teleĵurnalo "Noticias 1" je la sama tago (rete re-spektebla, de minuto 29).

Vespere, "Aragón Radio" kontaktis kun L. Noguero kaj faris 10-minutan intervjuon dum la posttagmeza programo "Escúchate".

Oni komentis, ke la dato (kaj celebulo) rilatis al la publikigo en 1887 de la "Unua Libro" de Zamenhof. Por amantoj de libroj, interesas konstati, ke la komenco de la E-aventuro troviĝas ĉe libro. Bone, unue kaj esence, ĉe la idealo kaj interna ideo (almenaŭ lingva) de Zamenhof. Sed la materia manifestiĝo konkretiĝis je libro, je nia "Unua Libro". Do, en la komenco estis la vorto... la vortoj (kaj sentoj). Kaj en tiu naskiĝa libro jam estis beletrio, poezio. Pri Zamenhof kaj ties poemoj, kun Kalocsay "oni povas diri, ke ne per Esperanto li faris poezion, sed per la poezio li faris Esperanton" (W. Auld: "Enkonduko en la originalan literaturon de Esperanto").



Oni komentis, ke la dato (kaj celebulo) rilatis al la publikigo en 1887 de la "Unua Libro" de Zamenhof. Por amantoj de libroj, interesas konstati, ke la komenco de la E-aventuro troviĝas ĉe libro. Bone, unue kaj esence, ĉe la idealo kaj interna ideo (almenaŭ lingva) de Zamenhof. Sed la materia manifestiĝo konkretiĝis je libro, je nia "Unua Libro". Do, en la komenco estis la vorto... la vortoj (kaj sentoj). Kaj en tiu naskiĝa libro jam estis beletrio, poezio. Pri Zamenhof kaj ties poemoj, kun Kalocsay "oni povas diri, ke ne per Esperanto li faris poezion, sed per la poezio li faris Esperanton" (W. Auld: "Enkonduko en la originalan literaturon de Esperanto").

Esperanton" (W. Auld: "Enkonduko en la originalan literaturon de Esperanto").

LORENZO NOGUERO

Aragono

Teruelo

La Esperanto-grupo de Teruelo, Liberanimo, rekomencas siajn agadojn post la longa paŭzo pro la pandemio.

En septembro ni organizos la ESPERANTO-SEMAJNON EN ALBARRACÍN (Teruelo). Notindas ke Albarracín estis la origino de la Esperanto-movado en Teruelo kaj Aragono ĉar tie, jam en la 1903a, fondiĝis la Esperanto-grupo "Santa María"

Ni ankoraŭ ne povas konkreti la datojn sed, komence de septembro, ni okazigos ekspozician semajnon (en la ekspoziciejo de la urbodomo de Albarracín) kaj du prelegojn: La unua pri "Esperanto: la lingvo por la paco", de Alberto Granados, prezidanto de Liberanimo, kaj la dua, de la historiisto Serafin Aldecoa, pri "Albarracín, la origino de Esperanto en Aragono"

Sed la plej elstara venonta agado de Liberanimo estos la tuja publikigo kaj prezento de la libro "ESPERANTISTAS DE TERUEL / ESPERANTISTOJ DE TERUELO", verkita de Serafin Aldecoa. La eldono estos dulingva, en la hispana kaj la esperanta. Temas pri verko kiu enhavas tre interesajn informojn pri la plej elstaraj esperantistoj en la provinco Teruelo (Francisco Azorín, Julio Belenguer, Ricardo Mallén, Serafin Villarroya ...) kaj pri la diversaj grupoj kiuj estis fonditaj en Alcañiz, Albarracín, Teruelo. Kompreneble la aŭtoro dediĉis ĉapitron al la nuntempa esperanto-movado en Teruelo, al la kreado de la grupo Liberanimo, al 76 HEK ...

Alberto Granados

REELDONO DE LA LERNOLIBRO DE MIGUEL GUTIÉRREZ ADÚRIZ

HEF reprenis la lernolibron "Esperanto, curso del idioma internacional", de Miguel Gutierrez Aduriz, ĉar ĝi estis elĉerpita. Ĝi estas la plej sukcesa lastatempa lernolibro de la internacia lingvo por hispanlingvanoj, el kiu vendiĝis ĝis nun pli ol 4000 ekzemploj.

La vendoprezco estas 12 € (10 € por HEF-anoj kaj 7€ por grandaj mendoj, ekz. por libroservoj) plus sendokosto.

Tiun libron kaj aliajn por legi kaj praktiki dum la someraj monatoj vi povas aĉeti en la Libroservoj de Madrida Esperanto-Liceo kaj de HEF, kies katalogon vi trovas en la reta adreso: <https://www.esperanto.es/hef/index.php/aprender-esperanto/venta-de-libros>. Ilin vi povas aĉeti ankaŭ en la sidejo de la strato Rodríguez San Pedro, 13.

KAMPANJO AL UNESKO PRI LA ESPERANTO-TAGO

Ĉiujare Unesko festas la Tagojn de la lingvoj Angla, Ĉina, Portugala, Rusa, Romaa... Kiam ĝi festos la naskiĝtagon de Esperanto, kiu kiel internacia lingvo multe kontribuis al la mondaj kulturo, paco kaj komunikigo de la popoloj, deklarita kiel nacia nemateria kultura heredaĵo de Pollando kaj Kroatio, kaj uzata en Unesko-Kuriero kaj aliaj Unesko-eldonaĵoj? Fakte la vera naskiĝdato de Esperanto, t.e. la 26-a de julio, estas festata de nia komunumo jam 134 jarojn.

Mankas tamen oficiala agnosko fare de Unesko. Tio estas delonga revo de multaj esperantistoj tra la mondo. La deklaro kredeble utilis al la disvastigo de kaj informado pri Esperanto. Ĝuste pro tio UEA lanĉis kampanjon por konvinki Uneskon deklari la 26-an de julio kiel la “Internacian Tagon de Esperanto”.

Por sukcesigi la kampanjon ni devas unue konvinki Membrojn Ŝtatojn (kies instancoj kutime estas Unesko-komisionoj/ oficejoj en la landoj) iniciati la proponon al Unesko; persvadi kiel eble plej multajn Membrojn Ŝtatojn esprimi sian apogon en la voĉdonado. Ĉi tion faris HEF la 13an de julio: ĝi formale prezentis al la “Comisión Nacional Española de Cooperación con la UNESCO”, instanco kiu pendas de la ministerio pri eksteraj aferoj, skrib-peton, por ke tiu nacia komisiono siavice petu, ke la Ĝenerala Konferenco de UNESKO deklaru la 26an de julio kiel la “Internacia Tago de Esperanto”. Tiucele ni tradukis kaj uzis la malnetojn antaŭe preparitajn de UEA.

Pri eventuala reago ni raportos. el Gazetaraj Komunikoj de UEA, n-ro 964

DEBATO PRI LA ESTONTECO DE EŬROPO

Ĉu esperantoparolantoj apogas proponojn favorajn al nia lingvo en la kadro de la Eŭropa Unio? Se tiel, ni uzu la eblecon partopreni la civitanan dialogon, kiu estis oficiale lanĉita antaŭ kelkaj tagoj kadre de la Konferenco pri la estonteco de Eŭropo. Kiel elemento de la Konferenco la eŭropuniaj civitanoj estas invitataj proponi kaj diskuti ideojn, kiamaniere la EU evoluu.

La Eŭropa Komisiono starigis platformon por tiu civitana kundiskuto, pere de la retejo: <https://futureu.europa.eu/> (havebla en ĉiuj 24 oficialaj lingvoj de EU).

Kelkaj proponoj jam afiŝitaj rilatas al la lingva reĝimo de la EU (komuna lingvo, lingva justeco, ktp.). Kelkaj el ili pledas por la uzo de Esperanto, kaj vi povas trovi ilin pere de la interna serĉilo.

La eŭropaj esperantistaj asocioj proponas ke oni koncentriĝu sur la plej apogataj, kaj inter ili, oni povas speciale atenti tiun proponitan de esperantisto el Onubo (Huelva), kun la anglalingva titolo: “Esperanto, a common and neutral language, designed to be easy to learn. A new tool for a more united European Union”. Ĝi estas nun la plej voĉdonata en la sekcio “Aliaj ideoj”. Trovu ĝin en la ligilo: <https://futureu.europa.eu/processes/OtherIdeas/f/8/proposals/5399>.

Siavice, ankaŭ Hispana Esperanto-Federacio (HEF) sendis leteron al la politikaj grupoj kiuj konsistigas la hispanan parlamenton, atentigante pri la lingva situacio en Eŭropa Unio kaj proponante uzi la lingvon Esperanton kiel labor-lingvon en la institucioj de EU.

NOVAJ MODELOJ POR ZOOMAJ KURSOJ INTER LA MUROJ DE EVENTA SERVO

La Tri Novaj Internaciaj Kursoj de Valencio
Dennis Keefe, Valencia Esperanto-Grupo

Ekde antaŭ nun pli ol unu jaro la nova retejo www.eventaservo.org listigadas ĉiajn eventojn en Esperantujo: lokajn kaj internaciajn, ĉeestajn kaj virtualajn. En tiu retejo videblas kongresoj de Esperanto, babilrondoj, diskuto-grupoj, prelegoj, kunvenoj de fakgrupoj, eĉ preĝo-kunvenoj, kaj aliaj. Ĝis nun listiĝis en la retpaĝoj de Eventaservo centoj da esperantaj aranĝoj.

Pri la starigo de Eventaservo kelkaj homoj meritas nian dankon. Speciala danko al Fernando Ŝajnini el Brazilo, kiu kreis ĝin, kaj dankon al Yves Nevelsteen kaj UEA, kiu nun subtenas la retejon. Dankon ankaŭ al la aliaj kursolistigoj de www.edukado.net, kaj al la jardeka laboro de *Eventoj* -- servo de László Szilvási de Hungario.

En la lasta jaro, dum la pandemio kiam ĉeestaj kursoj provizore malaperis, oni povis konstati en la evento-listoj, ke kelkaj kursospecoj abundis: tiuj por lerni la bazon de la lingvo je niveloj A-1 aŭ A-2 de la KER-sistemo, aŭ kursoj je nivelo B-1 aŭ B-2. Krome estis kursoj kiuj stariĝis por servi konversaciajn bezonojn de novaj parolantoj de Esperanto. De tempo al tempo ankaŭ videblis specialaj lingvo-ludoj. Sed inter ĉiuj tiaj kursoj mankis io. Mankis kursoj kiuj baziĝas sur konkretaj temoj ekster la esperanta gramatiko. Mankas kursoj kiuj ne rekte rilatas lingvo-lernadon, kaj kursoj kiuj baziĝas sur konkreta libro, konkreta kurso-materialo. Mankas temo-kursoj, kursoj ne pri, sed PER Esperanto. Ekzemple, en la lasta jaro, kun escepto de tiuj de Valencio, ne estis eĉ unu kurso kiu utiligis literaturan verkon aŭ ian sciencon kiel kurso-temon.

Unu grava escepto al tiu manko estas la nova seminario de Katalin Kovats, kies kerno estas la nove eldonita verko: *Manlibro pri Instruado de Esperanto*. Do jen ni havas unu ekzemplon de temo-kurso (la temo estas LINGVO-INSTRUADO), kiu baziĝas sur konkreta legomaterialo. Tiu reta instruado, kiu ĉiusemajne havas 10 sesiojn de 60 minutoj, kaj 10 sesiojn de 90 minutoj, estas perfekta monstro pri kiamaniere oni povas kunligi la legadon kaj studadon de unu konkreta studomaterialo, ĉi tie libro, kun esperanta kurso, temo-kurso.

Sed la Manlibro-Kurso ne estas la ununura internacia, virtuala temo-kurso kiu vidiĝis sur la retpaĝoj de Eventaservo, ĉar estas ankaŭ tri aliaj, kaj tiuj tri aliaj naskiĝis ĝis unu jaro antaŭe en la Esperanto-Grupo de Valencio. Eblis tia naskiĝo pro la lastatempe vigla kunlaborado de la Esperantistoj de tiu surmara regiono. Eduardo Alonso Navarro re-naskis la longe dormantan organon de la loka klubo, la *Valencia Luno*. Elias Hernández Capdevila viglis en la kreado de vorto-ludoj televide inspiritaj. Rosa Zanón Ferrando de la apudvalencia urbo Cheste lanĉis Lingvan Festivalon tie, kaj el tio, devenis nova kurso de Esperanto en la loka lernejo por plenkreskuloj. Raúl Salinas Monteaĝudo, kaj Ivan García kreis novajn retpaĝojn kaj ilojn por Esperanto-Informado. Post longa dormemo, Valencio komencis revigliĝi.

Estis tiu fekunda grundo en kiu estiĝis la tri novaj esperantaj kursoj, ĉiuj temo-kursoj, kiuj baziĝas sur konkretaj verkoj: La unua tia kurso estis kurso pri la libro *Don Kihoto*, la dua pri la libro, *La Praktika Bildvortaro de Esperanto*, kaj la tria pri la kompleta reta kurso, *Enkonduko al Astronomio kaj Astrofiziko*. Poste mi klarigos la enhavon kaj la detalojn kune kun specimenaj demandoj de la kurso-materialo de tiuj tri kursoj.

Estas pluraj trajtoj kiuj helpas distingi tiajn kursojn de antaŭaj, ĉeestaj lecionaroj en Valencio. Unu trajto de tiuj tri kursoj estas, ke ĉiuj el ili estas internaciaj, do la ĉeestantoj devenas ne nur de niaj lokaj kluboj en la regiono Valencio, sed ankaŭ el la tuta mondo. Ĝis nun venis gelernantoj kaj ĉeestantoj el Francio, Germanio, Britio, Svislando, Portugalio, Brazilo, Meksiko, Kanado, Usono, Pollando, Italio, Slovakio, Hungario, Norvegio, Rusio, kaj Koreio. Kelkaj el ili vizitis nur unufoje, aliaj alvenas de tempo al tempo, kaj aliaj nun ĉiam ĉeestas ĉiujn lecionojn.

Tre longdaŭraj kursoj. Alia trajto de la kursoj estas, ke ili estas longdaŭraj, kun konkreta komenco-punkto kaj eventuala fino-punkto. La Kihoto-kurso, ekzemple, daŭros 126 lecionojn, ĉar estas 126 ĉapitroj en la libro. La kurso kiu utiligas la *Praktikan Bildvortaron* daŭros 75 sesiojn, ĉar estas ĝuste tiom da bildo-paĝoj en tiu libro. La kurso pri Astronomio kaj Astrofiziko enhavas 33 lecionojn, ĉar Profesoro Amri Wandel faris 33 instruoprelegojn de po ĉirkaŭ unu horon. Videblas klare, ke tiuj kursoj estas multe pli longaj ol kutimaj, "tradiciaj" retaj kursoj en Esperantujo. Kaj pro tio, ke la lecionoj okazas nur po unu ĉiusemajne, la kurso de la libro *Don Kihoto*, daŭras, en-kalkulante la ferio-periodojn, pli ol tri jarojn! Tiu de la *Bildvortaro*, du jarojn, kaj tiu pri Astronomio, unu jaron. Kiel ni diris, la kursoj estas longdaŭraj!

Alia trajto kiu distingas la Valencianajn kursojn estas, ke du el ili – Kihoto kaj Astronomio – bezonas antaŭpreparon, antaŭlegadon, antaŭspektadon, por povi plene partopreni en la lecionoj. La gelernantoj havas multe da laboro, multe da hejmtaska legado. Do, ekzemple, la 28an de majo ĉi jare, la gelernantoj en la literatura kurso devis antaŭlegi Ĉapitron 52 de Kihoto, kaj la 25an de junio, tiuj en la kurso de Amri Wandel pri Astronomio (fakte, la kurso estas diskuto-grupo kursgvidata ĝis nun de Dennis Keefe), devis spekti la kvaran lecionon, pri la sunsistemo, en la Universitato de Esperanto ĉe www.universitato.info Tiu antaŭa preparo-laboro konsistas ne nur el legado (Kihoto) kaj spektado (Astronomio), sed ankaŭ el provado kompreni la enhavon, memori la enhavon. Kial tiom da laboro? Ĉar la lecionoj konsistas, alia trajto, el demandaro pri la enhavo de la legaĵoj, kaj en la kazo de Astronomio, pri la enhavo de la videbla, antaŭfilmita leciono. La kurso *Bildvortaro*, aliflanke, ne bezonas ian ajn antaŭpreparon.

Kaj papera kaj virtuala kurso-materialo. Ni elektis ĝuste tiujn tri kursojn parte, ĉar la kurso-materialo estas konsultebla tradicie papere, aŭ virtuale ciferece. Gelernantoj povas trovi la legaĵojn en libroservoj, en siaj lokaj esperantaj bibliotekoj, aŭ eĉ sur iliaj propraj hejmo-bretaroj. Sed samtempe, kaj tio gravas, ĉiuj kiuj ne havas tiajn alirojn al la paperaj libroj povas tuj trovi la materialon, senpage, rete. La kurso de Astronomio estas speciala, ĉar ties materialo estas filmita, sed ĝi lokiĝas ankaŭ duloke: ĉe la Universitato de Esperanto www.universitato.info, kaj, dank' al la laboro de Valenciano

Ivan Garcia, ĉe la fama reta arkivo www.archive.org.

Simile kiel ekzistas multe da manieroj gvidi tradiciajn kursojn por instrui la lingvon Esperanto, estas ankaŭ multe da diversaj stiloj por prezenti temo-kursojn kiel literaturon, sciencan, aŭ specialajn subtemojn kiel kurson pri vortaro aŭ pri vorto-lernado. Tiuj diversaj stiloj kaj metodoj, tamen, multe limiĝas se la kurso estas virtuala, ne-ĉeesta. La transiro de ĉeesta kurso al virtuala kurso povas multe malrapidigi, eĉ lamigi la instruadon. Ŝanĝoj kaj modifoj bezonatas kiam oni enretigas, zoomigas ĉeestan kurson.

En ĉi tiu artikolo mi prezentos unu metodon kiu funkcias bone por ni kaj por niaj gelnantoj. Estas certe multe da aliaj taŭgaj instruo-metodoj por tiaj temo-kursoj. Ĝis nun, tamen, aparte la tre bonan kurson de Katalin Kovats, ni ne havas aliajn ne-Valenciajn temo-kursojn. Espereble tio ŝanĝiĝos en venontaj jaroj. Ni bezonas vidi kaj sperti multajn temo-kursojn kaj diversajn metodojn. La Valenciaj kursoj devas esti nur unu malgranda parto el tio.

Ne-ĉeesta kurso ne permesas ĉiajn komunikado-metodojn, ne permesas ĉiajn kutimajn procedurojn, kiuj eblas kiam ĉiuj kursanoj sidas vidalvide en klasĉambro. Ekzemple, prezentado de nova materialo estas ege pli malfacile virtuale. Libera interparolado ankaŭ ne eblas en optimuma maniero en zooma etoso. La kunveno-servo *Jitsu* permesas kelkajn eblojn, kaj *Zoomo* realigas tiajn eblojn pli bone teknike. Tamen la virtuala leciono restas mankohava. Nenio pli bona ol esti ĝuste tie kie troviĝas la instruisto kaj la kunlernantoj.

Do, mi devis, kiel kurso-verkinto, fundamente ŝanĝi la enhavon kaj la metodon kiun mi utiligas kaj utiligos en tiuj tri novaj zoomaj, internaciaj kursoj en Valencio. El kio konsistas tiu nova metodo kaj kurso-materialo?

Ĝenerale, kaj por ĉiuj el la tri kursoj, mi uzas la saman aliron. Mi kreas demando-liston. Por Kihoto la plejparto de la demandoj pritraktas KIO OKAZIS? La libro Kihoto estas longa rakonto, kiu estas evento-plena. En preskaŭ ĉiu ĉapitro de tiu libro, pluraj aferoj okazas, kaj tio permesas starigi fakto-demandojn pri tiu okazaĵo. Pro tio, la kerna demando estas ofte *Kio okazis? Kion ili faris? Kial? Kie kaj kien? Kiu kaj kiun, kiuj kaj kiujn?* Resume, esence, *Kion ili faris?*

Aliflanke, en la kurso pri Astronomio, Profesoro Amri Wandel skizas, analizas, sintezas, kaj antaŭ ĉio, tre bone klarigas tiun sciencan, do por tiaj lecionoj dum la zooma diskuto-grupo, la demandaro rilatas la konceptojn, kiujn li klarigas pri nia sunsistemo kaj universo. Demandoj kiel *Kio okazas* ankaŭ aperas, sed en scienca kunteksto, ne en literatura rakonto-disvolviĝo. Poste, ni vidos ekzemplojn.

En la Bildvortaro, la demandoj ankaŭ estas ĉiam en la formo de demando-listo, sed ĉi foje ili rilatas individuajn bildetojn. La bildoj estas objektoj, do O-vortecaj, tamen ĉiu O-vorto havas siajn rilatojn kun ago-konceptoj, verboj; kun kvalito-konceptoj, adjektivoj; kaj kun diversaj aliaj vortetoj, sed ne nur. Ankaŭ vorto povas esti diversajn eksterlingvaj rilatojn en nian kapon, kaj tiaj aferoj estas ankaŭ pridemandeblaj. Poste vi vidos ekzemplojn.

La kompleta demandado konsistas ne nur el demandoj, sed ankaŭ el alternativaj respondoj. Preskaŭ ĉiam mi listigas ĝuste kvar alternativojn, el kiuj la lernanto elektas unu (kelkfoje plurajn). Tia striktan prezentadon de la demandaro devigas la virtuala fono de la kurso. En ĉeesta kurso mi ne antaŭe vidigis alternativajn respondojn al la lernantaro; mi uzus liberan respondadon, kaj se iu eraras, iomete post iomete, mi restarigus la demandon ĝis kiam unu al alia lernanto trafus respondos. Tia ĉeesta aliro rilate demandojn estus tro kaosa en kutima, virtuala medio. La gelernantoj en zooma leciono bezonas ne nur aŭdi, sed klare vidi la lingvon. Klareco estas ŝlosila en la retaj kursoj.

Kiel oni povas imagi, verki la demandaron kaj verki la alternativojn estas iom longa laboro. Tio speciale videblas en la Kihoto-kurso: Ĉiu leciono havas preskaŭ ĉiam 25 demandojn. Kaj ĉiuj demandoj havas po 4 antaŭskribitajn respondojn. Do, tio estigas la verkadon de 125 lingvaj demandaj, respondaj elementoj ĉiusemajne. La libro enhavas 126 ĉapitrojn, do ĉe la fino de la kurso la suma enhavo de demandoj kaj respondoj egalos 15,750 partojn! La demandaro kaj kutima testo-formato similas. Kaj pro la abundo da ekzercoj, oni lernas ne nur pri la verko Kihoto, oni akiras – nerekte – profundan vortprovizon kaj tre firman scion pri gramatiko de Esperanto.

Kiel dirite, la Kihoto-kurso konsistas ĉefe el konkretaj demandoj, fakto-demandoj, pri tio kio okazis en la ĉapitro. Jen unu ekzemplo: Leciono 52, Demando 22:

Kihoto finfine atingis sian vilaĝon kaj tie abundaj homoj volis vidi lin. Aliflanke, la edzino de Sanĉo finfine post ok monatoj re-renkontiĝis kun sia edzo. Kion ŝi unue volis scii de Sanĉo? 1) kiel lia azeno fartas, kaj ĉu Sanĉo kunportis donacojn por ŝi 2) ĉu eblis tuj havi amrilatojn post la tagmanĝo 3) ĉu vojaĝante Sanĉo povis facile retumi kaj skribi retroŝtajn mesaĝojn 4) ĉu li bone fartis, kaj ĉu Kihoto bone traktis lin la tutan tempon.

En tiu demando, unu el pli ol tri mil (125 ĉapitroj oble 25 demandoj en ĉiu ĉapitro = 3150 demandoj), oni povas vidi aliajn trajtojn de tia demandado. Unue, mi ofte skribas antaŭparton de la demando por orientigi aŭ por resumi iomete la rakonton (*Kihoto finfine atingis sian vilaĝon*, ekzemple). Tion mi farus ankaŭ en ĉeesta kurso. Due, oni vidas ian humuron. Tia humuraĵo povas esti absurdaĵo, ĉi tie anakronismo, ĉar oni ne retumis en la 17a jarcento. Ofte la ne-logikaj alternativoj por la demandoj pritraktas aktualaĵojn de Esperantistoj aŭ de la Esperanto-Movado. De tempo al tempo mi eĉ ektuŝas politikon (ĉefe por primoki la antaŭan prezidenton de Usono Donald Trump). La humuraĵoj servas por iom distri kaj pensigeti, sed ankaŭ por limigi la elekto-eblojn. Mi ne volas, ke la demandoj estu tro malfacilaj. Elekti inter inter tri alternativoj estas pli facile ol inter kvar.

La kurso pri Astronomio havas kelkajn fakto-demandojn, sed ankaŭ abundajn koncepto-demandojn, ĝuste tiajn, kiajn ne-esperantaj studentoj vidos en sciencaj fakoj en siaj universitatoj. Jen ekzemplo de unu el tiaj demandoj el la kvara leciono:

La estiĝo de nia sunsistemo enhavis plurajn fazojn. Kio estis la unua fazo? 1) Iu stelo rompiĝis en diversajn partojn. 2) Asteroidoj kaj aliaj grandaj spaco-objektoj kuniĝis

*ĉirkaŭ iun stelon. 3) Granda nubo aŭ nebulo da interstela gaso kolektiĝis. 4) Plane-
doj formiĝis unue, kaj la Suno, poste.*

Rigardante la suprajn demandojn el Kihoto kaj el Astronomio, oni povas facile konkludi, ke ne eblas bone respondi al la demandoj sen bone legi la ĉapitron en Kihoto antaŭ la leciono, aŭ bone spekti la lecionon pri Astronomio en la retejo www.universitato.info antaŭ la leciono. Tamen, kaj tio gravas, samtempe estas relative facile elekti, eble ne ĝuste trafi, sed elekti unu el la kvar alternativojn. Estas tiu trajto de la kurso kiu permesas al ĉiaj Esperantistoj de niveloj C1 kaj C2 partopreni la kurson, eĉ se ili scias nenion pri literaturo, kaj tute ne memoras la scienccon kiun ili lernis antaŭ multe da jaroj en la lernejo. Kaj eĉ se ili ne faris siajn hejmtaskon, studante antaŭe la materialon, ili povas sufiĉe lerte elturniĝi. Tamen, ne estas la celo doni la kurson al gelernantoj kiuj ne antaŭe preparas. La kurso estas por homoj kiuj vere volas lerni ion ne pri Esperanto, sed per Esperanto.

Ni substreku eble, ke la plej bona aliro por ĉiuj estas antaŭprepari, sed kelkfoje tio ne eblas, kaj samtempe, bonaj gelernantoj ne volas maltrafi iun ajn lecionon. Do, kelkfoje lernanto ĉeestas lecionon sen esti bone preparita. La strukturo de la kurso kun demandoj kune kun alternativaj respondoj praktike permesas tion.

En la kurso pri la Bildvortaro, kiel dirite NE estas antaŭpreparo por la gelernantoj; ĉio okazas dum la leciono. La demandoj kaj alternativoj sekvas la saman modelon, tamen, de la alispecaj kursoj, kaj jen unu ekzemplo de paĝo 18, en la bildo pri la klasĉambro:

Dekstre de la tornistro (en la bildo) troviĝas liniilo. En kia leciono la gelernantoj uzos ĝin? 1) en kurso pri biologio por mortigi muŝojn por posta mikroskopa analizo 2) en kurso de kemio por kirli iun miksaĵon kiu troviĝas en bovlo aŭ pistujo 3) en kurso de geometrio por desegni la hipotenuzon aŭ alijan laterojn de triangulo 4) en kurso de historio pri la mezepoko kaj renesanco, por ke geknaboj lanĉu salivo-pilketojn al aliaj gelernantoj kiam la instruisto ne vidas ilin.

En tia demando kaj tiaj alternativoj oni povas vidi, ke estas unu vorto substrekita, ĉi tie, liniilo. Tiu vorto estas la vorto, pri kiu temas la demando. La numero de la demando rilatas la numeron de la objekto en la bildo, kaj en ĉi tiu bildo pri la klasĉambro estas 27 objektoj, do estas 27 demandoj pri la bildo. Tiu strikta rilato inter la demando-numero kaj la bildo-numero multe helpas por la klara, logika, sinsekvado de la leciono. Tiun metodon mi ankaŭ uzus se estus ĉeesta leciono. Do, en la demando-serio mi neniam starigas du demandojn pri la sama objekto, kaj neniam transsaltas demandon. Aldonante aŭ preteratentante demandojn eble donus pli bonan lecionon pri la enhavo, sed tio multe ĝenus la ege facilan uzon da la materialo. Por plibonigi tian neoptimuman situacion, la kursgviganto povas starigi aldonajn, spontanajn demandojn INTER la listigitaj.

Estas notinde, ke la celo de la kurso pri la *Praktika Bildvortaro* ne estas nur lerni la

bildigitajn, do pridemanditajn, substrekitajn vortojn. Tio estas parto de tio, kion mi volas fari, sed ankaŭ gravas, ke mi enkonduku multajn aliajn vortojn, kiuj iel rilatas tiun celvorton. Depende de la leciono, kutime estas almenaŭ duoble pli da tiaj vortoj, kaj ofte ĝis kvinoble pli.

Tiaj aldonaj vortoj ne estas prezentataj hazarde kiel en staplo da vorto-kartoj. Ili ekzistas unue en kohera demando-respondo-unuo, kaj due en koheraj frazoj, kie vortoj semantike, sencohave interrilatas. Tiuj kromvortoj estas tre zorge elektitaj.


Ekemple, en la supra ekzemplo vi vidis vortojn kiuj ne estas ĉiam konataj aŭ ĝuste uzataj de multaj Esperanto-parolantoj: *tornistro*, *submikroskopa*, *kirli*, *pistujo*, *hipotenuzo*, *latero*, *mezepoko*, *renesanco* kaj similaj. La tuto havas unue koherecon videblan en la subtemo *kursoj* (*biologio*, *kemio*, *geometrio*, *historio*).

Krome, due, la individuaj frazoj havas sian koherecon interne: *tornistro*, *liniilio* (du aĵoj ofte uzataj de junaj lernejoj); *kemio*, *kirli*, *miksaĵo*, *bovlo*, *pistujo* (kvin aspektoj de leciono pri kemio); *geometrio*, *hipotenuzo*, *latero* (tiel oni parolas en tia matematika kurso); *historio*, *mezepoko*, *renesanco* (subpartoj de historia periodo). La teorio estas, ke tia interrilatigo helpas al la gelernantoj bone lerni novajn vortojn. Se tiaj vortoj ne prezentiĝas kune, estas pli malfacile lerni ilin individue, aparte. Ekzemple, *hipotenuzo* kaj *latero* havas logikan interrilaton, do ni lernu ilin samtempe, kune.

Mi priskribis iom detale la principon *semantika kohereco*, ĉar mi utiligas la saman metodon kiam mi verkas la Kihoto-Kurson kaj la kurso pri Astronomio, eble ne tiom ofte, ĉar la celo de tiuj kursoj ne estas lerni kiom eble pli da novaj vortoj, sed lerni pri kio okazis en Kihoto, kaj kia estas nia sunsistemo kaj universo en Astronomio.

Do eĉ en tiuj du ne vorto-celaj kursoj ekaperas alternativoj kiuj enhavas interrilatojn, ekzemple, en la kurso pri Astronomio: *surplanediĝi*, *surteriĝi*, *surluniĝi*, *surmarsigiĝi* kaj *survenusiĝi* (ĉi tie la vortoj estas la ĝustaj esprimo por "surteriĝi" sur aliaj, jam nomataj astroj en la spaco). Aŭ, en iu leciono de Kihoto: *troviĝas*, *norda poluso*, *suda poluso*, *antipodo*, *latitude*, *longitude*, *distanco de* (ĉi tie la vortoj ĉiuj rilatas lokon aŭ lokigon). Ĉiuj el la tri kursoj daŭre klopodas ne nur rekte rilate la enhavon: literaturon, sciencon, kaj bildo-vortojn, sed ankaŭ helpi al la gelernantoj pli bone koni la profundan vortaron de Esperanto, kaj la mirindan sistemon por vortfarado.





Kiom da tempo mi bezonas por verki unu lecionon de tiuj tri kursoj? Eble inter du kaj kvar horoj por la Bildvortaro, kaj kvin aŭ ses por Kihoto kaj Astronomio. Por doni al vi ideon, mi diros kiel mi kreas unu ĉapitron de Kihoto. Unue, mi aŭskultas la ĉapitron hispane. Tio estas afero de inter 15 kaj 25 minutoj. Post tio mi ofte reaŭskultas kaj saman ĉapitron hispane aŭ eĉ germane, kaj kelkfoje mi iom antaŭeniras kaj ankaŭ aŭskultas la sekvan parton de la libro. Poste mi legas la ĉapitron hispane kaj esperante, aŭ inverse, esperante kaj hispane. Tiam mi zorge enskribas notojn sur la paperan libron, pripensante eventualajn demandojn.

Unu tagon poste mi komencas skribi komputile la demandojn kun la malfermita libro nur en Esperanto apud mi. Mi ĉiam nun celas ĝuste 25 demandojn, do mi devas multe priatenti pri la distribuo de tiuj demandoj tra la paĝoj de la ĉapitro. Mi skribas per la sekva ciklo: unu demandon, kvar alternativojn, sekvan demandon, kvar alternativojn, ĝis la lasta,

unu demandon, kvar alternativojn, sekvan demandon, kvar alternativojn, ĝis la lasta, 25a demando.

En la sekva tago, mi tralegas la tuton, korektante erarojn kaj ĝustigante kaj kontrolante la enhavon laŭ la kriterio *vereco*. Mi kontrolas ĉiujn vortojn, pri kiuj mi havas eĉ dubeton, en PIV kaj en PREVO. Post la kontrolado kaj korektado, mi konservas la lastan version en mian komputilon. Tiu lasta versio estas nomata *DK, leciono x, originalo*. En postaj lecionoj, mi devas ŝanĝi nur la ĉapitro-numeron *x*, kaj tiel, ege facile retroveblas ĉiuj ĉapitroj por eventuala reuzo, re-instruo.

Tiam, farante duan kopion nomatan *DK, leciono x, montrado por zoomanoj*, mi preparas la paĝon kiu videblas al ĉiuj gelernantoj dum la zooma leciono. Mi pligrandigas la litero-grandecon de 12 al 18. Mi forprenas tri centimetrojn de la dekstra marĝeno, kaj unu el la maldekstra, kio faciligas la legadon de la zoomanoj dum la leciono. Tuj poste mi tralegas la tuton, klopodante, ke neniu demando-komenco restu orfo, tio estas, ke ĝi ne komenciĝas en la ekstrema dekstra marĝeno per nur numero aŭ per tro mallonga vorto, malfaciligante la komprenon. Tiam mi enmetas tri liniojn da spaco inter ĉiuj demandoj, por ke la gelernantoj vidu nur unu demandon samtempe. Sen sufiĉe da interdemanda spaco, povas esti, ke du demandoj ekaperos samtempe sur la sama ekrano, kio povus ĝeni la glatan disvolviĝon de la kurso.

Kaj finfine, por ke aliaj kursgvidantoj en aliaj lokoj en aliaj jaroj povu facile utiligi la materialon, mi kreas trian kopion nomatan *DK, ĉapitro x, kursgvidanto*. Tie troviĝas la respondoj kaj interdemandaj komentoj kune kun konsiloj, kiujn aliaj instruistoj povas, se ili volas, uzi.

Tiun saman tri-kopian lecionaron mi faras ankaŭ por ĉiuj aliaj tiaj kursoj. La celo ne estas, ke la kursoj nur ekzistu en Valencio kaj nur de tie tra la mondo per retaj kursoj; la celo estas, ke venontece kursgvidantoj, kaj virtualaj kaj ĉeestaj, havos sufiĉe bone jam preparitan kursomaterialon, facile uzeblan en plej diversaj situacioj.

Por konkludi, ni diru, ke estas bone, ke almenaŭ unu kurso pri Don Kihoto ekzistas nun en Hispanio, sed estus pli bone, ke tiaj kursoj ekzistas ankaŭ alilande. Tiaj kursoj. Tio estas kurso, longdaŭra, kiu baziĝas sur literatura verko. Pensu pri aliaj klasikaĵoj el Azio, Eŭropo, Nordameriko kaj Sudameriko, Afriko. Kiu verkos kaj instruos la unuan kurson pri unu el la famaj ĉinaj klasikaĵoj *Vojaĝo al Okcidento* aŭ *Ruĝdoma Songŝo*? Tiaj longaj libroj ekzistas ankaŭ en Esperanto. Kaj kiu verkos la materialon por prezenti en internacia kurso, niajn multajn antologiojn, la Svedan, la Svisan, la Korean, la Brazilan, la Katalunan, **la Polan, la Rumanan, la Estonan** . . . ? Ankaŭ ekzistas krestomatioj. Kaj staras la Ibera Skolo. Hispanio, ni atendas vin. Ĉinio, ni atendas vin. Azio, Eŭropo, Ameriko, Afriko, antaŭen!

La ideo starigi kursojn kiuj baziĝas sur libro tuŝas ne nur la klasikajn kaj beletrajn librojn. Estas preskaŭ senfina listo de libroj kiuj povas bone kaj bele esti uzataj en temo-kursoj. Pensu pri la romanoj de Claude Piron, tiuj de Sten Johansson. Libro de Auld, Baghy, kaj Kalocsay. Mi devas listigi la nomojn de multaj aliaj nuntempaj aŭtoroj, tio estus bona. Tamen estus eĉ pli bone se kelkaj el niaj modernaj verkistoj povus ion ĉerpi el ĉi tiu artikolo, kaj sendepende de la metodo kiun mi prezentis ĉi tie, tiuj aŭtoroj povus ekstarigi alian aliron por didaktike, lernopaŝe transiri siajn verkojn.

Kaj kiel la leganto probable jam konstatis legante ĉi tiun artikolon, la vojo por novaj, specialaj kursoj estas vaste malferma. Ĉia materialo, de la Universitato de Esperanto www.universitato.info ĝis la enciklopedio Vikipedio mem eo.wikipedia.org, povas servi kiel bazon de novspecaj kursoj, longdaŭraj kursoj, profundaj kursoj – ne por lerni la lingvon, sed por utiligi Esperanton por aliaj celoj, por lerni ion alian PER Esperanto, aŭ kiel la belga Esperantisto Germain Pirlot dirus: Ne pri Esperanto, sed PER Esperanto.

Dennis Keefe, Cullera, la 12an de julio, 2021.



LA PLEJ LONGA FERVOJA LINIO ELIRAS EL HISPANIO

En la historio de fervojoj oni asertas ofte, ke la plej longa linio estas tiu de la trasiberia fervojo kun longo de 9.288 km, de Moskvo al Vladivostoko ĉe Pacifiko. Eĉ se oni kalkulas kelkajn apudajn branĉojn, la trasiberia fervojo etendiĝus tra 10.267 km. Tamen, ekzistas alia linio kiu etendiĝas tra 13.052 km, temas pri la fervojo inter Madrido kaj la urbo Jivu, en la orienta regiono de Ĉinio.

Ĉi tiu vagonaro, karganta varojn, trapasas ok landojn kaj uzas tri malsimilajn trakmezurojn. Ĉi tiu vojaĝo daŭras 16 tagojn, do, temas pri la plej longa fervoja linio en la mondo. Ĝi estas konata kiel la “Fervoja Silka Vojo”.



Lokomotivo de la fervojo inter Madrido kaj Jivu

Ĉi tiu fervojo ekfunkciis en la jaro 2014 kaj, kiel dirite, ĝi trapasas ok landojn (Hispanio, Francio, Germanio, Pollando, Belorusio, Rusio, Kazahio kaj fine Ĉinio). La linio naskiĝis post esploro de rapida kaj malmultekosta linio por transporti varojn inter Oriento kaj Okcidento. Tiel, ĉi tiu linio estas ses-foje pli ĉipa ol transportado pere de aviadiloj kaj ankaŭ pli rapida ol ŝip-transportado. Verdire ŝipoj bezonas 45 tagojn por plenumi tiun saman linion. Do, oni kalkulas, ke estas ŝparataj 1.000 eŭroj po kontenero.

Vojaĝo okazas du-foje en la semajno kaj averaĝe oni kargas 40 kontenerojn, tio estas 40 vagonojn. El Madrido eliras oliv-oleo, porkaĵoj, vino, industriaj produktoj; siafoje Ĉinio sendas ĉefe teknologiajn objektojn kaj varojn, kiuj poste estos vendataj ĉe bazaroj, la plej grandaj var-tenejoj de ĉi tiuj produktoj en Hispanio troviĝas en la madrida vilaĝo Fuenlabrado. Dum vintro oni uzas specialajn kontenerojn, fabrikitaj en Germanio, kun propra hejtado por eviti malaltajn temperaturoj de la regionoj trapasataj de la vagonaro.



Kiel dirite, la sola celo de ĉi tiu fervoja linio estas la transportado de varoj. Tamen, oni pristudas la eblon aldoni kelkajn vagonojn por pasaĝeroj. Se tiel, eblaj vojaĝantoj devus pagi pli ol 2.000 eŭrojn por realigi vojaĝon nur taŭga por senhastuloj, oni devas memori, ke la averaĝa rapideco de la vagonaro estas 25 km/h, en neniuj loko de la linio oni atingas rapidecon pli alta ol 100 km/h. Krome, eblaj pasaĝeroj reale devus esti aventuristoj, pro la fakto, ke en kelkaj regionoj trapasataj de la fervoja linio, la temperaturo estas 30 gradoj sub nulo.



Hispana amikaro de Fervojistoj Esperantistaj

Fervojisto@esperanto.es

José María Rodríguez


IOM DA MATEMATIKO (3) ...

Morto pro malvarmo en vintra tago

Dum vintra frosta tago, kiu pli riskas forpasi pro malvarmo, ĉu infano ĉu plenkreskulo?

Antaŭ ol respondi tion, jen alia demando: kio malvarmiĝas pli antaŭe, ĉu granda kruĉo plenplena de varma lakto, ĉu eta glaso plenigita per la sama lakto? Respondo estas evidenta, ĉu?

En ĉiu objekto, la varmo, kiun ĝi entenas, elfluas de interne eksteren tra la ekstera surfaco de tiu objekto. Do, ju pli da surfaco ĝi havas des pli da varmo ĝi elsendas. Sekve, la granda kruĉo elsendas pli da varmo ol eta glaso. Tamen, la kruĉo havas pli da volumo, do “enhavas pli da varmo”. La rezulto estas ke la eta glaso malvarmiĝos antaŭ ol la dika granda kruĉo.





Nun imagu ke ni havus infanon 1-metran alta apude de plenkreskulo 2-metran alta. Kaj ni supozu ke tiu adulto estas double pli granda ol la infano laŭ la iliaj tri dimensioj.

Ĉu la haŭta surfaco de la plenkreskulo estos ankaŭ double? Tute ne.

Ni povas vidi ke, se oni duobligas SEGMENTON kies longeco estas 1 kaj ni konstruas per ĝi dudimensian FIGURON (kvadraton), la areo de tiu figuro ne 2-obliĝas, sed 4-obliĝas.

Simile, se per tiu SEGMENTO kies longeco estas 1 ni konstruas 3-dimensionan objekton, ekz. kubon, kaj ni duobligas tiun segmenton, la volumo de la nova kubo ne 2-obligas sed 8-obligas.



Analoge, nia plenkreskulo kiu duobligas siajn tri dimensiojn rilate al infano, havas 4-oblan korpan surfacon, do elŝprucas 4-oble pli da varmo. Tamen, lia volumo estas 8-oble pli granda ol tiu de la infano, sekve enhavas 8-oble pli da varmo.

Tial, dum vintra malvarma tago, infano nekonvene vestita tre probable mortus post malmulte da tempo ĉar lia eta korpo ne havas sufiĉe da volumo por enhavi la necesan varmon.

Kompreneble Naturo estas saĝa kaj donis al infanoj diversajn rimedojn por survivi en malhelpaj cirkonstancoj, ekzemple, pli viglan metabolon: eble vi spertis kion da varmo eliras el bebo, kiu kuŝas sur viaj brakoj.

Tio estas ankaŭ la kialo de la ĝenerale grandega aktivemo de etaj bestetoj kun varma sango: ili devas daŭre manĝeti por nutri metabolon, kiu bezonas produkti multe da varmo; kontraŭe, pro ilia malgranda volumo, la etaj vivaĵoj tuj perdis la internan varmon kaj mortus.

Rilate al ĉio ĉi, kiam grimpisto supreniras altajn montojn kie regas granda frosto, estas kelkaj korpopartoj, kiuj plej ofte suferas gravajn damaĝojn pro malvarmo: nazo, oreloj, fingroj, ktp. Ili ĉiuj havas ion komunan: grandan surfacon rilate sian volumon; sekve, facile foriras varmo tra la surfaco kaj samtempe ne estas granda ŝanco retenigi varmon pro malgranda volumo. Tial laŭlonge de la jarcentoj, homoj elimagis diversajn vestaĵojn por sin protekti de la ekstera malvarmo: gantojn, ĉapelojn, orelumojn, ktp.

*Jesús M. García Iturriz
jmgiaa@hotmail.com*

KJARA RAKONTAS PRI SI MEM

1.- Antaŭparolo

Je la komenco de 2019, en Esperantio aperis nova verda stelo. Ĉi-foje temis pri kantista kaj muzikista stelo: **Kjara** (adaptiĝo de ŝia itala nomo, **Chiara Raggi**). Ŝia muzika propono vere frapis min ekde la unua aŭskultado de ĉiu peco de **Blua Horizonte**, ŝia unua albumo en Esperanto. Baldaŭe, mi traserĉis interreton por trovi pli da informo pri ŝiaj vivo kaj kariero.

Dum la kronviroza pandemio, same kiel okazis al aliaj artistoj, Kjara devis ĉesigi sian agadon antaŭ publiko. Tamen, Kjara regalis siajn fanojn per plurnombraj belegaj koncertetoj, elsenditaj perrete. Tio estis ja bona ŝanco aprezi ŝian elstaran talenton ĉe la kampoj de kanto, gitarludado kaj komponado de siaj propraj verkoj. Kaj ne gravas ĉu ŝi kantas en la itala aŭ en esperanto, ĉar tio tute ne malhelpas la ĝuadon de ŝia propono; cetere, ŝia prononcado de la Zamenhofa lingvo estas perfekta... Supozeble, ŝi ankaŭ utiligis tiun tempon de deviga hejmrastado por prilabori novajn projektojn, pri kiuj ŝi iom rakontos dum la suba intervjuo.



Du jarojn post ŝian eniron en Esperantujo, Kjara publikigis novan unuopaĵon (titolata **Mozaiko**, denove ĉe **vinilkosmo**). Kaj tiam mi aŭdacas peti intervjuon al ŝi. Tiun peton mi proponas pere de ŝia reprezentanto ĉe Esperantujo, **Paola Nigrelli**, kiun mi ege dankas pro ŝia afableco.

La respondoj donitaj de Kjara estas tiel bone esprimitaj kaj skribitaj, ke mia deziro verki apartan artikolon pri ŝi finfine estos plenumita per la simpla kopio de tio, kion ŝi respondis al miaj kelkaj demandoj. Mi aldonu kelkajn bildojn. Kaj jen: farite.

Koran dankon, Kjara, pro via talento kaj via afableco. Kun vi, Esperantujo estas eĉ pli bela kaj pli kompleta.

2.- Intervjuo

Kie vi naskiĝis? Kia estis via infanaĝo?

Mi naskiĝis en Rimini, itala urbo ĉe la maro en la regiono Emilia-Romagna. Mia Infanaĝo estis paca, ĉirkaŭita de la amo de mia familio. "Normala" infanaĝo en la plej bona senco.

Mi ŝatis lerni, mi fartis bone en lernejo, mi praktikis naĝadon, kaj muziko tuj fariĝis parto de mia vivo.

Kiam kaj kiel vi eklernis muzikon?

Mi kantadas tiel longe, ek de kiam mi memoras. Kiam mi aĝis 7 jarojn, mia patrino aligis min al prepara kurso en la Konservatorio de mia urbo. Ĝi estis enkonduka muzika kurso kaj tie mi raviĝis. Tiam mi decidis ludi gitaron; mi estis 10-jaraĝa. Ekde tiam mia aventuro en muziklando komenciĝis.

Mi studentigis ĉe la Konservatorio kiam mi estis jam 20-jaraĝa, sed mi ekverkis kantojn ekde la 16-jaraĝo. Kanti miajn kantojn estis la laboro, kiun mi volis plenumi, kiam mi plenkreskos. En 2001 mi aperis sur scenejo unuafoje kun koncerto de miaj kantoj kaj mia profesia kariero komenciĝis tie.



Jen Kjara sceneje

- Kiuj estas viaj plej ŝatataj artistoj?

Estas diversaj kantverkistoj, kiuj markis mian vojon. Unue: Joni Mitchell. Ŝi ŝanĝis la historion de kantverkada muziko en la mondo:

Rafinita kantisto, aŭtoro de gravaj tekstoj, pionira muzikisto kaj bonega gitaristo. Ŝi revoluciigis la mondmuzikan scenon, en kiu la virino fine havis lokon ne nur kiel kantisto, sed ankaŭ kiel muzikisto kaj produktantino. Mi ankaŭ ŝatas Suzanne Vega kaj la novgeneraciajn kantverkistojn: Esperanza Spalding, Becca Stevens, Gretchen Parlato; kaj ankaŭ plej multajn el la tradiciaj italaj aŭtoraj muzikistoj.

Mallonge rakontu pri via muzika kariero (diskoj, koncertoj, ktp)

Mi povas resumi dudek jarojn da kariero en 4 albumoj: tri en la itala kaj unu en Esperanto. Lastatempe aperis mia nova unuopaĵo “Mozaiko” en Esperanto, kiu temas pri kunpartigo kaj espero. Dum la lasta jaro mi ankaŭ fariĝis muzikentrepenisto. Mi kreis muzikeldonejon, interretan revuon kaj eventojn dediĉitajn al inaj kantverkistoj.

Koncertoj estas multaj tra la itala teritorio kaj ankaŭ eksterlande. Post jaro de pandemio mi povas diri, ke mi tre sopiras vivi ludante, kun la publiko antaŭ mi. Estas signoj de rekomenco kaj mi esperas, ke ĝi fariĝos ĉiam pli bona.

Kiam vi ekesperantiĝis?

En 2018 mi eniris en esperantan kulturon per koncerto de miaj kantoj kantitaj en Esperanto (majstre tradukitaj fare de Ĝanfranko Molle kaj Renato Korsetti) en la Itala Nacia Kongreso de Esperanto kiu okazis en la Respubliko San-Marino. Ĝi estis koncerto, kiun mi neniam forgesos kaj la esperanta publiko estis tiel varma kaj bonvena, ke mi decidis antaŭeniri kaj lerni la lingvon por kombini du universalajn lingvojn: muziko kaj Esperanto.

- Kiuj estas viaj porestantecaj projektoj?

Unue mi koncertos por prezenti mian plej novan albumon en la itala “**La Natura e la Paziienza**”.

Nun mi laboras pri du albumoj en Esperanto: unu estos eldonita en 2022 kaj la alia en 2023. Du malsamaj projektoj: unu el miaj kantoj, la alia estas tre ambicia projekto sed grava por mi pri kiu mi ne povas ankoraŭ malkaŝi pli.

Mi daŭre produktos muzikon por aliaj inaj kantverkistoj per mia muzikeldonejo “**Musica di Seta**”.

Mi partoprenos kun diversaj projektoj en la Itala Nacia Kongreso en Assisi ĉismere kaj mi vere ĝojas pri ĝi.



Kovrilo de la dua albumo de Chara Raggi

3.- Diskaro de Kjara (Chiara Raggi) en la itala lingvo, kaj jaroj de ĉiu

- *Molo 22* (Mar-kajo 22): 2009
- *Disordine* (Malordo): 2015
- *Lacrimometro* (Larmo-mezurilo): 2017
- *La Natura e la Pazienza* (Naturo kaj Pacienco): 2020

Aldone, direndas ke *Musica di Seta* (la nomo de la muzikeldonejo de *Kjara*) signifas en esperanto “muziko el silko” aŭ “silka muziko”.

Juan García del Río

STUDO PRI IBERIAJ LINGVOJ DE ESPERANTISTO: RECENZO DE *ASSIM NASCEU UMA LÍNGUA*, TIEL NASKIĜIS LINGVO, (LISBONO 2020):

DE FERNANDO VENÂNCIO

Sónia Duarte (tradukis Xana)

Fernando Venâncio. 2020. *Assim Nasceu Uma Língua - Sobre as origens do Português*, Tiel naskiĝis lingvo – Pri la origino de la portugala. 5a eldono reviziita eldono. Lisbono: Guerra e Paz. 318 paĝoj. ISBN 978 - 989 - 702 - 510 - 5.

Fernando Venâncio. 2021. *Assim nasceu uma língua – Sobre as origens do Português*. Vigo: Guerra e Paz. 363 paĝoj. ISBN 978 - 84 - 9151 - 617 - 0

MI ANKAŬ ESTAS ESPERANTISTO.

Tiel priskribis sin Fernando Venâncio pasinjare, fejsbuke, post prezenti la unuan eldonon de sia lasta libro, en Oporto, en UNICEPE (Libreja kooperativo de studentoj de Oporto)¹ Kiel eblas tie legi, la aŭtoro de la teksto pri kiu ni okupiĝas, agrable surpriziĝis, kiam rimarkis ke, inter la publiko – kaj eĉ inter la kunprezentantoj de la evento –, estis lernantoj kaj instruistoj de enkonduka kurso de esperanto organizita de la kooperativo kie la sesio okazis:²

Do, karaj. Imagu mian surprizon kiam mi malkovris ke la librejo Unicepe, en Oporto, organizas kursojn pri ESPERANTO...

Mia menso vojaĝis 60 jarojn antaŭen, kiam mi mem, tiam flua esperantisto, instruis al miaj kolegoj en tiu bela kaj ingenia Internacia Lingvo.

Gratulojn Unicepe, kaj bonan laboron, esperantistoj!

La konteksto de malformala instruado-lernado de esperanto dum la 60aj jaroj, priskribita de Fernando Venâncio, rilatas al situacio de subpremo de libereco en Portugalio dum la diktaturo *Estado Novo* (Nova Ŝtato 1933-1974), dum kiu oni multe kontrolis kolektivan kaj asocian aktivadon. Tion konfirmas Sónia Gomes (2016: 291-292), en sia doktoriĝ-tezo pri la esperantomovado en Portugalio 33³: “sen asocio aŭ sidejo, la esperantistoj plu improvizis, kaj esperanto ne malaperas.” Laŭ la sama aŭtoro (2017: 292), anstataŭ en instituciaj kaj oficialaj kursoj, esperanton oni plu lernis, pere de inter aliaj iniciatoj, malformalaj grupoj de babilado/lernado kaj de klerigaj prelegoj.

¹ La aŭto de Fernando Venâncio en sia paĝo de fejsbuko, okazis la 5an de decembro de 2019. La prezentado en UNICEPE okazis la antaŭan tagon, la 4an de decembro, kaj pri ĝi respondecis Sónia Duarte (Centro pri lingvistiko de la Universitato de Porto). La teksto kiun ni publikas baziĝas sur verkita versio de tiu komunikado. La sesion prezentis Vaz Pinto, prezidanto de UNICEPE, kaj eblis dum ĝi aŭdi partojn de la verko, legatajn de la aktoro kaj teatrologo Nuno Meireles.

² La unua tia kurso okazis en Septembro de 2018, gvidata de Alexandra Paz kaj Roger Prieto, kaj ekde tiam, ĉiujare oni ĝin ripetis, okazis en 2020 la tria kurso.

³Sónia Piedade Apolinário Ribeiro Gomes. 2016. O esperanto em Portugal: língua internacional e movimentos sociais. Doktoriĝo. Lisbono: ISCTE-IUL. Alirebla rete ĉe: <http://hdl.handle.net/10071/15819> [kontrolita la 20 de septembro de 2020]. De la sama aŭtoro: 2012. O esperantismo em Portugal (1892 a 1972): origens, afirmação e repressão. Majstriĝo. Lisbono: ISCTE-IUL. Alirebla rete ĉe: <http://hdl.handle.net/10071/5177> [kontrolita la 20 de septembro de 2020].

La rilato de la aŭtoro kun la grupo de esperantistoj en Oporto kiun li konis dum la prezentado de sia libro, pluis per ĝia paĝo en fejsbukoj *Esperanto Porto*⁴. Pasintjule dum la kongreso de Sennacieca Asocio Tutmonda (SAT), kiu okazis, en 2020, virtuale, pro la pandemio de KOVIM-19, tiu rilato denove videblis en la fejsbukoj de la aŭtoro, kiam Fernando Venâncio tie diskonigis la iniciaton de la grupo de Oporto de ĉeeste partopreni, en *Universidade Popular do Porto*, Popola Universitato de Porto, la virtualajn sesiojn de la kongreso kaj aliajn lokajn samtempajn iniciatojn⁵. La aŭtoro tiam esprimis sin tiel:

ĈIAM JUNA REVO

Kiam mi estis 15 jara, mi flue parolis Esperanton. Kiam mi alvenis en Amsterdamo, en 1970, ĉiuj telefonbudoj havis instrukciojn ankaŭ em tiu "universa lingvo".

[...]

Tial, mi feliĉas pro vidi ĉiam, novajn klopodojn pri tiu donaco, al ĉiuj homoj, de dua facila kaj neŭtrala lingvo.

En Porto, Esperanto vivas.

Eblas rimarki, eĉ pro la ligo al esperanto ke, Fernando Venâncio (Mértola, 1944) montris, frue, scivolemon pri lingvoj kiu iom modlis sian profesian trajektorion. Li licenciĝis en 1976 pri Ĝenerala Lingvistiko, en la Universitato de Amsterdamo kaj doktoriĝis en 1995, en la sama Universitato, per la tezo *Estilo e Preconceito: a Língua Literária em Portugal na época de Castilho (1835-1875)*, Stilo kaj antaŭjuĝo, la literatura lingvo en Portugalio dum la epoko de Castilho. Li instruis en 3 nederlandaj universitatoj, kie li publikis plurajn verkojn kaj kunlaboris kun pluraj periodaĵoj.

Dum tiu trajektorio, lia atento al iberiaj lingvoj tre ĉefrolas, kiel rimarkeblas en sia lasta verko, kies kvinan eldonon oni ĵus publikis⁷ kaj kiu venkis (ex aequo kun la verko *Camões por Cantos Nunca dantes Navegados, de Nuno Júdice*) la 2020-a premio pri eseo Jacinto do Prado Coelho, de la Portugala Asocio de Literaturaj Recenzistoj. La elstara sukceso de tiu eseo, kiun oni priskribis kiel “viv-verko”⁸ povus, per si mem, pravigi noton pri ĝi, sed al tio aldoniĝas, ĉefe en medio kiel ĉi tiu, la maniero kiel la verko pritraktas la situacion de la lingvistikaj rilatoj en iberio: disvolvigante, diakronecan aliron de la portugala kadre de triflanka rilato kun la galega kaj la hispana. E f e k t i v e , Fernando Venâncio provizas al ni agrablan sed substancan kaj rigoran trarigardon, de la historio de la portugala, aparte pri leksiko, kaj samtempe, revizion de la rilatoj kiujn ĝi kreadis kun la galega kaj la hispana. En la vortoj de la aŭtoro “ĉi tiu estas, ni ripetu, libro pri vortoj, pri iliaj historioj kaj pri la strukturoj kiujn ili kaŝas. Ankaŭ estas libro kiu celas disvastigi konojn. Estanta agnoskite scienca, ĝi evitas, tamen, esti fak-literatureca. (p. 17).

⁴ <https://www.facebook.com/esperantoporto/>

⁵ Ekzemplo pri tio estas la nepublikigita prezentado de Sónia Gomes, kies titolo estas “Esperanto kaj sociaj movadoj en Portugalio”, prezentita la 30an de julio de 2020, per traduko de Alexandra Paz. La surbendigo de la sesio alireblas ĉe: <https://www.youtube.com/watch?v=7QZ9L5JQFy0>.

⁶ Ni kolektis la informon pri la aŭtoro de la publikaĵo pri li en la paĝaro *Ciberdívidas da Língua Portuguesa* - <https://ciberdividas.iscte-iul.pt/actualidades/montra/livros/assim-nasceu-uma-lingua/240> [kontrolita la 20 de septembro de 2020] – kaj ankaŭ de artikolo kiun ĵurnalo *Diário do Alentejo* dediĉis, junio de 2020 al sia samlokano - <https://diariodoalentejo.pt/pt/noticias/10197/fernando-venancio-assim-nasceu-uma-lingua.aspx> [kontrolita la 20 de septembro de 2020].

⁷ La pluraj eldonoj aperis rapide sinsekve kaj oni aldonis reviziojn kaj aliajn kontribuojn: 1-a eldono: novembro de 2019; 2-a eldono: decembro de 2019; 3-a eldono: februaro de 2020; 4-a eldono: marto de 2020; 5-a eldono: septembro de 2020.

⁸ Nuno Pacheco. 2019. “Entervjuo [al Fernando Venâncio]”. Revuo *Ipsilon*. 6a de decembro

La teksto estas strukturigita de enkonduko kaj kvar partoj: la unua tiu parto estas dediĉita al la fazo de aŭtonomio rilate al la latina kiel malsama lingvistika sistemo kadre de la duoninsulaj romancoj (de ĉirkaŭ la jaro 600 al proksimume 1400); la dua kaj plej vasta, pritraktas momenton de malatantaŭiro (ekde 1400) de tiu vojo: la tria, aludas al la alĝustigo de dinamikoj inter la galega kaj la portugala (kaj inter Galegio kaj Portugalio) de la pasinto al la nuntempo kaj la rolo pri tio de la hispana; kaj, fine la kvara, resumas/emfazas la ideojn pritraktitaj.

Paralele al tiu strukturo, kaj oportune interrompante ĝin, aperas ie kaj tie, etaj sekcioj titolitaj esprimplene kiel, “servo-stacio”. Estas fakte momentoj de “provizado” de kontekstiga informo aŭ paralelaj komentoj por aktualigi informon aŭ sporadaj klarigoj kiuj rilatas al la disvolvigitaj temoj kaj funkcias, je la fino, kiel tre oportunaj parentezoj. Sed ni pritraktu pli detale ĉiun parton de ĉi verko.

En la unua parto, antaŭ la malkapablo ekzakte kaj klare datigi “je kiu momento la latina fazo estis finfine superigita kaj estas nova idiomo”, la aŭtoro apartigas kaj priskribas la linvajn trajtojn per kiuj eblas materie rekonigi tiun momenton. Estas trajtoj tiaj la malapero de intervokalaj -l- e -n- kaj la simpligo de la latinaj grupoj de duoblaj konsonantoj LL kaj NN, kiel eblas vidi en la venontaj ekzemploj pri la vortoj flugi, soni, flava kaj jaro:

Latina	Portugala	Kastilia
VOLARE	<i>voar</i>	<i>volar</i>
SONARE	<i>soar</i>	<i>sonar</i>
AMARELLU	<i>amarelo</i>	<i>amarillo</i>
ANNO	<i>ano</i>	año

La analizo de tiuj fenomenoj disvolviĝas substrekante ilian signifon kiel apartaj trajtoj rilate al la najbaraj idiomoj, la reguleco de la rezultoj kiuj diverĝas de la hispana kaj substrekante ke “nia idiomo kaj la hispana havis malsamajn formiĝojn kaj, plejparte, malkunajn. Neniu el ili estis kiam ajn dialekto de la alia“. Je la fino de tiu parto de la verko, Fernando Venâncio substrekas ankoraŭ la neceson revizii niajn perceptojn pri Galegio kaj pri la portugala kaj la galega:

[...] la idiomo de la portugaloj ne aperis kun Portugalio, aŭ eĉ kiam Portugalio estiĝis, sed ja antaŭe. Jen neatentita perspektivo, kontraŭinta, por kiu kiel multaj el ni, ĉiam komprenis nian historian rolon ekde de la komfortaj limoj de ‘unu popolo, unu teritorio, unu lingvo’. Fakte, tia Historio kiun de antaŭ jarcentoj oni rakontas unu al la aliaj, estas rakontado farita laŭ nia strikta mezuro, alportante al ni komforton kaj memfidon” (p. 82).

Tiusece, la aŭtoro bedaŭras la foreston de Galegio kaj de la galega de nia fikto kaj de nia literatura kaj gramatika tradicio kaj finas, rekontrolante la tekstojn kiuj ĝin modlis kaj kelkaj signifoplenaj neestoj en ĝi, same kiel kelkaj kazoj en kiuj la ĉeesto de referencoj al la galega kaj galegio provas ĝeneralan rifuzeman teniĝon.

En la dua parto de la verko, sen forgesi kontinuecajn trajtojn, oni elmontras aliajn lingvistikajn trajtojn kiuj mildigis la rezultojn de la enprenita evoluo, en la fazo de formiĝo de la lingvo, iusece malsama de la latina kaj de la hispana. Inter tiuj lingvistikaj fenomenoj, la aŭtoro elstarigas la stabiliĝon de la solvo trovita por la fina naza diftongo kiun nuntempe oni reprezentas per –ão (kiel en la vortoj pano *pão*, diros *dirão*...). Sed eĉ pli grave, oni klarigas kiel la elekto implicita de ĝi de malsamigo de la antaŭaj lingvistikaj referencoj koincidas kaj rilatas al akuta devojiĝo de la galega kaj, simile, la atribuo de malprestiĝo al la nordaj parolmanieroj. Same grava estas la analizo kaj lingvistika, kaj histori-kultura kiu igas la aŭtoron, Fernando Venâncio, konkludi pri la rolo de Kastilio kiel kultura referenco (sed ne politika) kaj pri la procezo de alproksimiĝo al la kastilia elmontrita de la esplorado de leksiko.

Por la aŭtoro, la procezo de modeligo de la idioma kiun oni disvolvis kun la sudo kiel referenco estas rezulto de klara intenco priskribita kiel “lingvistika programo” (p. 110) de “malgalegigo” (p. 110) kaj konsekvence de alproksimiĝo al la leksiko de la hispana nur interrompita dum la XVIIIa jarcento, de nova kultura kaj politika kadro (pp. 184-185). Konsiderante kiel ilustra kazo tiun pri la pluraloj de la vortoj kiuj finas per -ão, Fernando Venâncio asertas: “[...] dum sufiĉe longe la hispana funkciis kiel kompas de la portugal-parolantoj, iom senhonta maniero agnoski subalternecon” (p. 130). Enfokusiĝante je tiu fenomeno, kiun li priskribas kiel “distingilo em la grafismo de la portugala” (p. 121), la aŭtoro trafoliumas kun ni paĝojn de nia teksta tradicio, taksante la sintenojn kiujn ili montras rilate al la diftongo -ão kaj la hispana solvo. Tiumaniere, inter aliaj, Fernando Venâncio relativigas la historiografian diskurson koncerne al la realproksimiĝo al la latina. Sed li tion faras ankaŭ per la elmontrado de ke la reenkonduko de -n- kaj -l- intervokalaj okazas pere de la hispana. Ne eblas, tamen, ne rimarki ke, malsame de studado pri leksiko, analizo subbazita je lingvistikaj pritaksadoj esprimitaj em la gramatika kaj ortografia tradicio,⁹ mildigus la konkludojn ĉi enskribitajn pri la rolo de la kastilia kiel referenco, evidentigante kompleksan panoramon em kiu, tiu kiu nun prezentas sin senkritike kiel referenco, sin proponas eksplicite kiel referenco male, se ni alproprigas bildon uzatan de Fernando Vázquez Corredoira (1998)¹⁰ por la galega, em studo kiu, pro sia temaro, kruciĉas kun tiu kiun ni pritraktas.



La tria momento de la teksto, startas de analizo kaj de strukturoj komunaj al aliaj lingvoj kaj de unikecaj strukturoj de la portugala, por, poste, konkludi pri la individueco de la lingvistika sistemo de la duoninsula nord-okcidento, digresii pri la kialoj de tiu individueco kaj diskuti, aparte profunde, la temon pri la pozicio de la portugala rilate al la galega, elmontrante la informon necesan al tiu diskuto kaj la necertecoj kiuj venas de ĝi. Estas kadre de tiu diskuto ke Fernando Venâncio prezentas la poziciojn de pluraj lingvistoj tiurilate, kaj panoramon de la

proponoj pri lingvo-politiko kiun oni tenas ĉefe pri la galega kaj rilate al kiuj li prenas pozicion, per vidpunkto sufiĉe kritika kaj de la pli radikala reintegrigemo, kaj de la reganta lingvistika politiko, kaj prezentas ĝenerale zorgojna rilate al ideologiaj kondiĉigoj de studoj tiaj, em kiuj, laŭ la aŭtoro “la idioma estas ekskuzo, strategio, kaj ne objekto de studado” (p. 222)¹¹.

⁹Cf. Sónia Duarte. 2017. *La lengua y la gramaticografía españolas en la tradición portuguesa - gramáticas y ortografías (siglos XVI a XIX)*, La hispana lingvo kaj gramatikografio en la portugala tradicio, gramatikoj kaj ortografioj (XVI al XIX jarcentoj). Doktorigo. León: Departamento de Hispana kaj Klasika Filologio. Universitato de León.

¹⁰Fernando Vázquez Corredoira. 1998. *A Construção da Língua Portuguesa Frente ao Castelhana – o Galego como Exemplo a Contrario*, La konstruado de la portugala lingvo rilate al la kastilio – la galega kiel mala ekzemplo. Santiago de Compostela: Eldonejo Laivento.

¹¹La akceptado de tiu pozicio kaj de la teksto ĝenerale, en Galegio kaj ne nur, estis celo de kritika debato. Pri tiu estas interesa ekzemplo la teksto “*Escolhendo cereijas em ‘Assim nasceu uma língua’*” elektante ĉerizojn em Tiel naskiĝis lingvo, teksto de Valetim Fagim pri ĉi tiu libro libro kaj publikigita, la 26an de januaro de 2020, em la paĝaro Praza.gal kaj alirebla ĉe ĉi tiu adreso: [https://praza.gal/opinion/escolhendo-cereijas-em-
assim-nasceu-uma-lingua?fbclid=IwAR17FFKty_1-
T1CJXetnQKTCkx6vQ2tIjZKab0FMO9J2HG9e790DYiQ](https://praza.gal/opinion/escolhendo-cereijas-em-assim-nasceu-uma-lingua?fbclid=IwAR17FFKty_1-T1CJXetnQKTCkx6vQ2tIjZKab0FMO9J2HG9e790DYiQ) [kontrolita dum septembro de 2020]

En la kvara kaj lasta parto de la verko, dum oni substrekas la kreivon de la portugala rilate al leksiko, uzante ekskluzivajn rezultojn de nia lingvo, oni ankaŭ atentigas pri memcenzura etoso de niaj lingvaj trajtoj, kiu influis nian tradicion de tekstoj pri la lingvo, sed kiu ankaŭ rimarkeblas en pli novaj spacoj de opinikreado (televido, gazetaro, blogoj, sociaj retoj, ktp.). De la unikeco kaj originaleco de la portugala, la aŭtoro esploras, em tiu lasta momento de la verko, la gravecon krei ligojn kiuj klarigu la originon de nia lingvo. Laŭ tiu vidpunkto la aŭtoro reprenas la ideon pri la kompleksa rilato de distanciĝo/alproksimiĝo al Galegio kiu influis nian tekstan tradicion kaj denove esploras la ideologiajn konturojn de tiuj dinamikoj de distanciĝo/alproksimiĝo.

Fine, la verko ĉi prezentita estas pozitiva aldono al la pristudado, ĉar disvolvas esploron pri temaro kiujn oni sufiĉe atentis kaj proponas revizion de la bibliografio prie, rilatigante la tiel nomatajn klasikajn studojn kaj aliajn ege novaj. Ĝi reprezentas, ĉefe, tre signifan aldonon al la studoj pri iberaj lingvoj, kaj pro la videbleco kaj centraleco kiu em ĝi havas la lingvistikaj trajtoj mem, kaj pro la prioritato kiun ĝi donas al diakronika aliro de tiuj trajtoj kaj la signifo de ilia persisto, kaj pro la neceso de

integrita analizo de tiuj datumoj en la duoninsulo, kiel cetere, la aŭtoro mem avertas, per la modesta tono kiun oni ofte rimarkas dum legas: “se ion ĉi libro montris, estas certe la malkonvenecon de eternigi priskribojn reciproke nepenetreblaj de la portugala kaj la galega” [...] De kion ni vidis ĝis nun kaj kion vidos, konkludo asertas sin: la galega estas la plej bona spegulo kien la portugala povas rigardi” (p. 201).

Ni lasas ĉi tie konsilon por legado kaj kontrolado, kaj, eĉ se malpli klare, ni esperas ke ni ankaŭ videbligis ke ĉi tiu legado bonas por esperantistoj: ĝi substrekas ke la lingvistika evoluo, la interlingvistikaj rilatoj kaj la lingvistika teorumado ne imunas je projektoj de asertado de unu lingvo rilate al alia Tiu estas temo kiu, kvankam male, estas en la radiko de la kreado de esperanto kaj alproksimigas nin de la pripensadoj kiujn oni povas trovi en la verko kiun oni proponas legi.

